Heinrich Heine,

Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, Romancoj V

tradukita de Manfred Retzlaff

Knabinon sorĉigis mia avin'
Kaj oni al brul-morto
Kondamnis post torturo ŝin;
Ŝi ne konfesis per vorto.

En fornon oni ŝovis ŝin,
Ŝi kriis pro sufero,
Kaj kiel korniko ŝi levis sin
En nigra fum' al supero.

Vi nigra plumhava avino de mi,
Ho, venu en mian karceron,
Enflugu tra l' krado al mi tien ĉi
Kaj portu al mi manĝaĵeron.

Ho nigra, plumhava avino vi,
Ho, zorgu por mia trankvilo,[2]
Ke l' korniko ne piku l' okulojn de mi,
Dum pendas mi de l' pendumilo
.

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, Romanzen V" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1984.*

MR-141-1 / Arg-712-1431 (2012-12-08 23:21:56)

[2] aŭ:
Min lasu en trankvilo,
Ne piku miajn okulojn vi,
Dum pendas mi de l' pendumilo.